



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 10 Oktobro, 2010

Kara Leganto! Septembre la membroj de nia E-societo aŭskultis ege profesian prelegon pri... trikado, jes vi ne eraris – TRIKADO. Elpaŝis multjara membro de nia kolektivo s-no B. Stigers, por kiu tiu “metio” fariĝis ne nur hobbio, sed signifa parto de la vivo. Fine de la bultennumero – informo de niaj partner-urboj: Kijivo, kie en 1998 okazis la 71-a Kongreso de SAT, venontjare akceptos IJK-on. En alia ĝemel-urbo de Ŝikago – Ŝanhajo – funkcias Monda Ekspozicio, pri kiu E-e informas reta revuo “El Popola Ĉinio”.

Ankaŭ ni ricevis interesan informon de la E-rotarianoj, sed lastmomente plago en la rotaria komunumo “Bona Espero” signife ŝanĝis la formaton de la oktobra numero.

–La Redakcio

Fajrego en “Bona Espero”

Ampleksa incendio detruis grandan parton de la teritorio de “Bona Espero” – la E-orfejo en Brazilio. La granda grundofajro trafis la regionon en la tria semajno de septembro, sed ne atingis la ĉefajn konstruaĵojn de “Bona Espero”. En sia mesaĝo la E-estroj de la orfejo, Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, rakontas pri la okazaĵo: “... Ni saviĝis el grandega fajro, kiu alvenis fortege nokte de la nordo. Se estus dumtage, oni pli sekure povus batali kontraŭ la flamoj, sed nokte ĉiuj bestoj, ĉefe la serpentoj, fuĝas de la fajro rekte al la homoj, kiuj volas kontraŭbatali... Tamen ni sukcesis defendi niajn domojn kaj legomejojn. Ĉe la lago ĉio estas nigra, kaj eĉ brulis la elektra drato kaj iom da tuboj...” Dum la nokto la laborantoj kune kun la infanoj provis haltigi la fajron ĉe vojo, por savi la konstruaĵojn:

La prezidanto de UEA, d-ro Probal Daŝgupta, en mesaĝo sendita al la retroŝta listo de UEA-membroj alvokis ĉiujn laŭeble doni financan subtenon al “Bona Espero” por ripari la damaĝojn.

–*Libera Folio*

Trikado: Ĉu Nur Hobbio?

Mi preskaŭ ektimis, ricevinte proponon de Viktoro prelegi pri mia hobbio, trikado. Tio estis pro la fakto, ke ia metio havas pli-malpli specialan vortaron, kaj se mi volas trakti detalojn de trikado, mi certe bezonas multajn, iom neoftajn vortojn! Malgraŭ tio, mi konsentis!

Unue, kelkajn vortonjn pri kroĉetado: kroĉetado estas multe pli nova ol trikado. Eĉ min surprizis tio, ĉar por kroĉeti oni bezonas nur unu hokon, sed por trikado estas bezonata du nadlosimilaj trikiloj. La plej fruaj konataj mencioj pri kroĉetado aperis en libro Memoraĵoj de Elmontara Sinjorino de Elizabeta Grant en 1812. La unuaj konataj eldonitaj kroĉetaj instruaj aperis en nederlanda gazeto en 1824. Alia indiko pri la noveco de kroĉetado en la XIX jc. estas eldono en 1847 de libro Vintra Donaco kio enhavas detalajn instruojn pri la diversaj eblaj maŝoj. Tamen, tiu libro supozis, ke legantoj jam konis aliajn kaj similajn kudrajn artojn. Mi ankaŭ klarigu, kvankam mi povaskroĉeti, mi priferas triki. Kroĉetita ŝtofo ne posedas la flekseblecon, kio apartenas al trikitaĵo. Trikvestaĵo sidas pli bone sur la portanto!

Ĝis nun la plej malnova trikitaĵo estas ekrovita dum XIX jc. en Egiptio.

Tio estas paro de ŝtrumpetoj entombigitaj iam inter la tria kaj la kvina jc. Tamen mi devas klarigi, ke tiuj ŝtrumpetoj estis fabrikitaj per metodo, kiu malsamas al hodiaŭa. La metodo utiligis nur unu ilon, similan al ordinara kudrilo. La laboristo metis tiun unuopan kudrilon en kaj el la diversajn maŝojn, kaj de tempo al tempo streĉis la fadenon por firmigi la maŝaron. Tia metodo daŭris dum jarcentoj, alia ekzemplo ek troviĝis en Jorkŝiro,



Anglujo, el la X jc., kiam la vikingoj ekloĝis tie. Ĉi metodo havas skandinavidikan nomon: Naalbinding.

Laŭ la Oxford Unabridged English Dictionary, la vorto triki aperis en la angla lingvo en la XV jc., kaj neniam ekzistis en aliaj eŭropaj lingvoj antaŭ tiu tempo. Iu ajn vorto mankas ankaŭ en la latina lingvo. En miaj retroŝtaĵoj por primoketi René Descartes, kiu skribis Cogito ergo sum, mi uzas frazon Acibus texo, ergo sum, kio signifas E-e Mi trikas, do mi ekzistas. Tamen, ĉar ne estas vorto en la Latina lingvo por triki, mia frazo estas fraŭdeta!



La plej malnova konata vera trikado estas el la X jc. kaj estis trovita en Egiptio. "Vera trikado" signifas ke la laboro fariĝis per du trikiloj. La plej fruajn trikitaĵojn kreis arabaj trikistoj, kiujn dungis reĝaj familioj. Kiam mi vizitis Hispanujon en 1998, mi iris en Abatinejon de la Reĝa Sankta Maria de la Paŝtrejo (Santa Maria la Real de Las Huelgas), kie mi miris pri tiuj ĉi gantoj (vd. foton). Tie mi ankaŭ rigardis kusenkovron el la tombo de Fernando de la Cerda, kiu mortis en 1275.

Hodiaŭ permana trikado estas preskaŭ hobia. Ekzistas maŝinoj, per kiuj individuaj trikistoj kreas trikaĵojn por vendado el la butikoj.

–Bruso Stigers

La 67-a Internacia Junulara Kongreso (IJK)

Vica 67-a IJK okazos la 14-21-an de Julio 2011 en Kijivo – ukraina ĉefurbo kun 1500-jara historio. Partoprenontojn akceptos sport-ripoza centro de renoma Kijiva Politeknika Universitato, situanta 30 km norde de Kijivo ĉe la bordo de Dnipro-rivero. Temo de la Kongreso – "Stabila evoluo – nova koncepto por evoluo de homaro". Plia informo estas trovebla en retejoj de UEA kaj TEJO. Bonvenon! –LOK



Ŝanhaja Monda Ekspozicio

La Ŝanhaja Monda Ekspozicio estis inaŭgurita antaŭ pli ol 4 monatojn. Por konatigi niajn E-legantojn kun la ekspozicio ni malfermis en nia reta "El Popola Ĉinio" rubrikon "Ŝanhaja Monda Ekspozicio" kun 7 partoj: Aktualajhoj, Pavilonoj, Vivplena ŜME, Verda ŜME, Pri Ŝanhajo, Programeroj de ŜME, Pasintaj Mondaj Ekspozicioj. Ĝi estas legebla ĉe: http://www.espero.com.cn/se/node_25167.htm. Ni volas scii, ĉu la artikoloj en la rubriko estas interesaj por vi. Kiajn artikolojn pri la ŜME vi volas legi? Via respondo estos tre utila por nia laboro. Antaŭdankon!

–Redakcio de El Popola Ĉinio

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

26an de Oktobro – A. Kolganov prelegos pri utilkompanioj de Usono
23an de Novembro – H. Perez revenis kaj...
12an de Decembro – tradicia Zamenhofa Tago

Resono: En nia numero 07_10 ni publikigis peton de S-no Pascal el Francio sendi al li fotojn de la E-istoj el la tuta mondo. Jam aperis interesa lumbilda prezentado, kie nia E-societo "ridetas" dufoje dank'al K. Offutt kaj B. Stigers: <http://vimeo.com/15523762>